

# POLA

# Kongresa numero

# Esperantisto

XXX JULIO  
JARO 1936

Esperantysta  
Polski

---

ELDONANTO WYDAWCA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO  
REDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — MGR. TAD. HODAKOWSKI  
REDAKTORZY

---

APERAS 1-an DE ĈIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI ĜIS LA 20-a DE ĈIU MONATO. LA REDAKCIO ESTAS RAJTIGITA LAŬ BEZONO SANGI LA TEKSTON DE MANUSKRIPTOJ.

---

## O. BUJWID.

### LA JUBILEA KONGRESO—INTERPACIĜA FESTO.

La kreinto de Esperanto postlasis al ni testamenton: efektiviĝi tion, kion ne povis fari li dum sia tro mallonga vivo.

Li postlasis al ni du gravajn taskojn: 1. Disvastiĝi la lingvon, kiun li opiniis la plej grava paŝo por reciproke alproksimiĝi la homojn, fari grandan rondon familian, konkordeman, tolereman. 2. Manifesti la internan ideon de esperantismo, celanta fratan kunvivon de l' homaro.

Ĉu ni alproksimiĝis al tiu celo? Ĉu ni estas pretaj sekvi la Majstron?

Mi dubas. Mi konstatas, ke ni anstataŭ progresi kaj alproksimiĝi al la ideo, forŝovis ĝian realigon. Ankoraŭ ĉiam la homo estas lupokontraŭ sia proksimulo. Li malamas, li malfidas, li envidas la alian. Kien iras la homaro?

Restis nur tre malmultaj, kiuj sekvas la instruojn de nia Majstro. Ĉu eble ni esperantistoj? Jes, sed bedaŭrinde, ne ĉiuj, ĉar mi vidas, ke en la rondoj de la disĉiploj de l' Majstro ne ĉiam regas konkordo kaj pacamo. Vere, la nuntempaj politikaj cirkonstancoj en tre multaj landoj kaj la teruraj ekonomiaj rilatoj rezultintaj kiel sekvoj de la mondmilito igas forgesi la homojn, ke ĉiujn nutras la sama tero, ke ĉiujn varmigas la sama suno, ke iliajn sortojn influas la sama Dio. La politika, ekonomia kaj socia strukturoj estas ŝanĝeblaj, la homaj ideoj kaj opinioj pri tiuj problemoj senĉese ŝanĝiĝas. Nur unu ideo estas neskebla: Amu vian proksimulon kiel vin mem! Malgraŭ ĉiuj kontraŭaĵoj kiujn starigis la postmilita vivo, tiu nobla ideo, kiu estas iden-

ta kun la interna ideo de esperantismo, loĝas en niaj koroj kaj plej videble manifestiĝas dum niaj universalaj kongresoj.

Se tie kaj ie en Esperantujo oni renkontas hodiaŭ simptomojn

de malkonkordo, tiuj simptomoj devas malaperi kaj certe malaperos dum nia Jubilea Festo en Varsovio, ĉar neniu volos ofendi la Spiriton de la Majstro, kiu ŝvebos super ni...

## *Ĝis revido en Varsovio*

*dum la Jubilea XXIX Kongreso de Esperanto en 1937 jaro*

Esperantaj birdoj, disjetitaj en la tuta mondo, flugantaj tra bluaĵoj de diverslandaj ĉieloj, etendu viajn flugilojn kaj kunflugu en venonta jaro sub ĉielon de Polujo, en ĉefurbon Varsovion!

ĉar neniu alia popolo estas pli, ol ni, rajtigita gastigi vin, esperantistojn, en solena jaro de la kvindeka jubileo de Esperanto.

Se pravis maljunaj Romanoj en sia kredo, ke ekzistas io, kio no-



Palaco en parko Łazienki.

Ni invitas vin per tiu ĉi kora alvoko en la nomo de popolo, kiu famiĝis dum centjaroj pro sia granda gastameco, kiu ĝis nun fidela estas al sia konata proverbo: „Gasto hejme — Dio hejme!“

Vi estos obeemaj al nia alvoko,

miĝas „genio loka“ (genius loci) — se ĝis nun tuŝas korojn bela legendo de multaj gentoj pri antaŭmoj, vizitantaj en grandaj memortagoj lokojn de sia eterna dormo — ni asertas vin, ke nia komuna patro, nobla kreinto de lingvo in-

ternacia, ke la Spirito mem de Zamenhof en tiu ĉi jaro 1937. vizitos Polujon, landon, kies filo li estis, kaj kies gloron en la mondo li disvastigis dank' al sia kreaĵo.

Kaj se Li venos, ĉu estas eble ke vi forestu?!...

vas honori Lin ĉe lia sankta tombo en varsovia tombejo, kie gardas liajn cindrojn la monumento, starigita dank' al via oferemo.

Alvokas vin la vivo kaj la morto — lulilo kaj tombo — eble rebrilo de l' Mekko kaj ombro de



Monumento de Princo Józef Poniatowski.

Vi devas ekvidi Lin kaj enspiri, kvazaŭ genion lokan en lando de lia naskiĝo — kaj per via spiro esperanta atesti, ke vi estas lia vivanta kaj fidela infanaro, vi de-

Golgotha lia — ĉar Li multe kreis en ĝojo kaj multe suferis, esperante kontraŭ malespero — jes! alvokas vin ne nur antaŭkvindeka ekkrio de naskiĝo de Esperanto,



sed ankaŭ milda flustro el hebrea tombejo: „mi, profeto de pli feliciaj pacaj tempoj, dormas ĉi tie jam dudek jarojn!“ Pro tio la venonta jaro estas duoble jubilea dato — dudekjaro post morto de la Majstro.

Ĉu vi povas rifuzi al ni la komunan kapkliton ĉe la cindroj de nia amata Patro en fratiganta nin lingvo?

Intenco nia estas honori en ĉi tiu kongreso la veteranojn de nia Esperanto-movado, kiuj travivis ĝis ĉi-tiu triumfa momento — ĉar ĝi estos triumfo de nia movado, se vi, samideanoj, kolektiĝos grandnombre por atesti, ke la mondo esperanta e pur si muove! Malkreduloj Tomasoj devas vidi kaj ekkredi.

Ne forgesu, ke ni ĉiuj estas ŝuldantoj ankaŭ al unu tombo — al tombo de Antoni Grabowski, perfekta tradukinto de „Sinjoro Tadeo“. Nia najtingalo atendas en katolika tombejo Powązki la kolektivan homagion de l' esperantistaro: **onorate l' altissimo poeta!**“

Eble la supre dirita sufiĉas por el ĝojaj esperantaj birdoj fari grandnombran pian procesion de pilgrimoj, plenplenigantaj la vojojn al Varsovio en 1937. jaro.

Sed ni esperas, ke troviĝas ankaŭ multo por gajemaj okuloj, ravemaj koroj, sciemaj animoj en nia Varsovio. Tamen ni ne volus reklame rakonti pri mirindaĵoj de nia amata ĉefurbo, sciante unuflanke, ke troigita per promesoj fantazio emas poste fariĝi elrevigita: — estas tiuj vojaĝantoj, kiuj, vidante piramidojn, diradis kun brakmovo: „Ni pensis, ke piramidoj estas pli altaj... Oni tiom rakontis!...“ Kaj duaflanke ni scias

bone, ke estas en Eŭropo grandaj ĉefurboj, kiuj havas pli multe da mirindaĵoj ol ni, ĉar ili ekzistas de pli malnovaj jaroj kaj certe evoluis en pli feliciaj kondiĉoj, en ĉiama libereco.

Tamen ni tute ne dubas, ke en nia modesta ĉefurbo vi trovos pli ol unu mirindaĵon originalan, kiu povas konkuri kun fremdlando, pli ol unu ateston de felicia renkonto inter maljuna genio pola kaj pramaljuna genio de l' arto eŭropa. Varsovio ja memoras la tempojn de l' gotiko kaj renesanco... la urbo ekzistas de la XIII. jc., travivis multe da bataloj, militoj, brulegoj, epidemioj... sed ĉiam konservadis senmortan rideton de gracieco kaj brava vivo.

Inter la kolono de Sigismundo III. ĉe la katedralo de S-ta Johano kaj ĉarma rezidejo de reĝo Stanislao Poniatowski troviĝos ne unu vidindaĵo, kiu postlasos neforgeseblan impreson. Kun intereso vi observos en periferioj de la urbo novan, plenan kaj riĉan pulson de l' vivo.


Kaj antaŭ ĉio vi renkontos unu tre maloftan nekutiman historian miraklon:

Vi ekvidos la fortan anime polon, kiun politika perforto volis enterigi jam antaŭ cent kaj dudek jaroj por eterne — kies koro tamen sub la tero batis per energia protesto — kiu memoris en epoko de mizero kaj mallibereco sian grandan egale-eŭropan pasintecon — kiu kuraĝe kaj multfoje ribelis — kaj kiu danke al sia braveco kaj kredo reviviĝis kvazaŭ Lazaro... Vi ekvidos sur homplenaĵoj stratoj, inter multaj konstruaĵoj kovritaj de patino de l' historia riĉa pasinteco, kaj multaj

novaj starigitaj per nuntempa energia laboro — la popolon forte irantan al progreso por egaliĝi kun progreso vere-eŭropa...

Unuvorte vi ekvidos Varsovion, ĉefurbon de Polujo, kies katenojn antaŭ pli ol centjaro forŝiris po-

vi ĝojos, ke en alia lando estas tamen io, plezuranta koron de alilandulo, — ĉe la aliaj vi konsoliĝos, ke ĉe vi, en via lando, estas pli bone, kaj des pli volonte post agrabla aventura vojaĝo vi revenos en viajn karajn hejmojn.



Arkada korto de Universitata Biblioteko Jagiellona kun monumento de Kopernik.

tence la nobla Kościuszko kaj disrompis en nuna epoko la genia Piłsudski... vi ekvidos ĝin libera kaj plena de vivdeziro...

Se inter briloj vi trovos ombrojn, inter floroj dornojn, ĉe la unuaj

Do alvenu kaj kunflugu en Varsovion, ho varme atendataj samideanoj — birdoj ĉielaj!

**Loka Organiza Komitato  
de la 29-a Universala Kongreso de  
Esperanto en Varsovio.**

## POLUJO — PITORESKA LANDO.

Polujo, kiel lando de kontrastoj, estas tre interesa ka' alloga por turistoj. Ĉar ĉion vi trovos ĉi tie.

Jen ravas vin ĉielatingaj montoj Karpatoj kun altaj granitaj Tatroj, el kies supro vi ĝui povas belegan panoramon, kie flustras akvofaloj kaj rapidkurantaj torrentoj, kie lagoj ĉirkaŭataj de grandaj rokoj respeguligas lazuron de l' ĉielo, kie pitoreskaj valoj kaŝas mirinde belajn lokojn...

Jen vi spiras plenbruste ĉe marbordo, kie kun milda bruo de ondoj kuniĝas ritmo de grandegaj maŝinoj, atestanta pri ĉiutaga kresko de nova pola haveno ĉe Balta Maro — Gdynia...

Jen okulo via vagas sur vastaj ebe-

najoj, kie bruetas oraj grenspikoj, kie alpremitaj al tero-nutrantino dometoj aspektas kiel blankaj floroj sur fono de verda arbar-muro...

Vi enprofundiĝas en arbaregon de Białowieża. Salutas vin kelkcentjaraj kverkoj kaj rakontas mallaŭtflustre pri ne-traireblaj marĉoj, pri erarvoj kaj pri tio, kio estis iam... Pasas horoj, longaj horoj — vi aŭskultas la rakonton de la arbarego...

Rakonti al vi pri ĉiuj mirindajoj de pola tero? Ne, venu al ni kaj mem ĝuu ĉion.

Invitas vin Polujo, invitas pola popolo, invitas tuta pola esperantistaro. Estu bonvenantaj en Polujo en 1937 jaro!

## OFICIALA KOMUNIKO

Nro 1.

**DE LA LOKA KONGRESA KOMITATO de la Jubilea XXIX. Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio en la jaro 1937.**

Interkonsente kun Pollanda Esperanto-Delegitaro estis elektita Loka Kongresa Komitato por la XXIX-a Jubilea Universala Kongreso de Esperanto, kiu organiziĝis jene:

Honora Prezidanto: Prof. Dr. Odo B u j w i d, Prezidanto de P. E. D.,

Prezidanto: Bronisław Bohdan W y s z y ŋ s k i, Prezid. de Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo,

Vic-Prezidantoj: Dr. Wilh. Róbin, Kazimierz Zajaczkowski, Leon Klimecki kaj Stanisław Karolczyk,

Generala Sekretario: Aleks. Hartman, Sekretarioj: S-ino L. Tazbirowa kaj J. Zawada.

Kasisto: S. Lubliner, anstataŭanto: F-ino Halina Weinstein,

Komitatoj: Miecz. Kaus, mgr. B. Strelczyk.

**Jubilea XXIX. Universala Kongreso de Esperanto Warszawa — 7—15 de aŭgusto 1937.**

**P r o v i z o r a p r o g r a m o.**

**Sabato 7. aŭgusto.**

19 h. Interkonatiĝa vespero kaj kabaredo.

**Dimanĉo 8. aŭgusto.**

9 h. Diservoj en preĝejoj.

10—12 h. Promeno tra la urbo.

12 h. Solena inaŭguro de Kongreso.

16 h. Malfermo de jubilea Ekspozicio.

17. h. Solena malfermo de UAB-Kongreso.

20 h. Teatro.

**Lundo 9. aŭgusto. (Jubilea Tago).**

9 h. Inaŭguro de l' Somera Universitato.

11,30 Ĉe la tomboj de l' Majstro kaj Grabowski.

16 h. Somera Universitato.

17 h. Solena kunsido de la Centra Komitato de UEA.

20 h. Solena Laborkunsido de l' Kongreso (Festo de Veteranoj).

**Mardo 10. aŭgusto.**

9—13 h. Fakaj kunsidoj.

Vizitado de l' urbo.

16—19 h. Somera Universitato.

20 h. Koncerto.

**Merkredo 11. aŭgusto.**

Pilgrimado al Białystok — naskurbo de l' Majstro.

**Ĵaŭdo 12. aŭgusto.**

10 h. Laborkunsido.

17 h. Fakaj Kunsidoj.

21 h. Internacia Balo.

**Vendredo 13. aŭgusto.**

10—13 h. Somera Universitato.

17 h. Folkloro prezentado.  
Festivalo kaj literaturaj konkursoj.

**Sabato — la 14-a de aŭgusto.**

10—13 h. Somera Universitato,

16—19 h. Fakaj kunsidoj,

20 h. Adiaŭa Vespero en Varsovio.

**Dimanĉo — la 15-a de aŭgusto.**

12-a Solena fermo de la Kongreso.  
Postkongresaj ekskursoj.

Turisma Sekcio de L. K. K. preparis jam detalan programon de l' ekskursoj tra Polujo, pri kiu ni informos en la dua Komuniko.

**Provizora adreso de L.K.K.:**  
LOKA KONGRESA KOMITATO, de  
XXIX-a UNIVERSALA KONGRESO DE  
ESPERANTO, WARSZAWA, ul. Chmiel-  
na 26, m. 8. (tel. 271-08).

Pro la jubilea karaktero de l' Kongreso ni petas insiste la tutmondan Esperantistaron partopreni organizon de l' Kongreso per konsiloj kaj sugestoj, ĉar L. K. K. deziras prepari **Jubileo** de Esperanto interkonsente kun gesamideanoj el ĉiuj landoj.

Ĉiu Samideano festu la Jubileon en la Mekko de Esperanto — **V a r s o v i o!**

## KRAKÓW IAMA REĜA ĈEFURBO DE POLUJO.

Kiu volas ekkoni la pasintecon de Polujo en la epoko de ĝia plej granda disvolviĝo same politika kiel intelekta, tiu nepre devas studi la memoraĵojn de Kraków. Pri Kraków diras jam araba komercisto Ibrahim en la X. jarcento, kaj post li la araba geografo Al-Bekri en la XI. jc. ke tiu ĉi urbo estas komerca kruciĝejo sur la vojo de okcidento al oriento. La fondo de episkopa diocezo en la jaro 1000. faris el Kraków sidejon de latina kulturo. Boleslavo la Kurba-buŝa dividante en la jaro 1139-a sian regnon inter siajn filojn, ordonis en la testamento, ke tiu dukoj, kies hereda landparto entenas Krakovon, estu ĉefo de la ceteraj dukoj, kaj tiamaniere Kraków fariĝis la ĉefurbo de Polujo, forprenante tiun ĉi karakteron de Gniezno kaj Poznań. Bedaŭrinde la regno perdis sian unuecon, ĉar formiĝis multaj duklandoj, sed danke al energio de la reĝoj Vladislavo Łokietek kaj lia filo Kazimiro, la Granda la apartiĝemo de la dukoj estis rompita, kaj Kraków komencis epokon de sia plej brila disvolviĝo. La reĝo Kazimiro la Granda finkonstruis la gotikan katedralon sur la monteto Wawel, komencitan ankoraŭ dum la regado de Łokietek, kaj fondis en la jaro 1364-a la Krakovan Universitaton. Kiam lia nevino Jadwiga (filino de l' hungara reĝo Ludoviko), heredante la polan tronon, edziniĝis kun la litova grandduko Vladislavo Jagiełło, kiu por ĉiam unuigis ambaŭ popolojn kaj ekrezidis en Kraków, tiam komenciĝis por tiu urbo „ora epoko”. Polujo fariĝis potenca ŝtato, kiu plensukcese repuŝadis tatarajn

kaj turkajn invadojn, savante tiamaniere la kulturon kaj sekurecon de okcidenta Eŭropo.

La reĝino Jadwiga komisiis en sia testamento al Jagiełło, ke li renovigu la universitaton, kaj lasis por tiu celo abundajn rimedojn. La reĝo strikte plenumis la volon de la mortinta edzino, kaj igis konstrui en la jaro 1400. novan sidejon por tiu plej supera lernejo. Mondfamaj scienculoj kiel ekz. Nikolao Kopernik (Copernicus) estis aŭ lernantoj aŭ profesoroj de la Universitato. Nuntempe la Universitato kiu havas 5 fakultatojn, nombras ĉirkaŭe 6.000 studentojn.

La Universitato ne estas la sola altlernejo, ĉar Kraków estas ankoraŭ sidejo de Akademio de Belartoj kaj de Minista Akademio. Krome en la internaciaj sciencaj rondoj estas Kraków famkonata kiel centro de pola scienco, ĉar ĉi tie troviĝas la Pola Akademio de Sciencoj.

\* \* \*

Neeble estas skizi en mallonga artikolo eĉ nur supraĵe la famajn krakovajn artmonumentojn. Kiel ĉefurbo de potenca regno en la fino de la mezepoko kaj komenco de modernaj tempoj, estis Kraków la ĉefa centro de pola kulturo kaj arto. En ĝi vivis kaj kree laboris multaj eminentaj artistoj, subvenciataj de la reĝa kortego, eklezio, nobelaro kaj riĉa, klera urbanaro. La krakova arto radiis malproksimen ekster la limojn de la urbo. En la lastaj jaroj de la XIX. kaj unuaj jaroj de la XX. jc. reviviĝas la arto en Kraków kaj reakiras sur tiu kampo sian antaŭan ĉeflokon.



La plej antikvaj arkitekturaj devenas el la IX. aŭ X. jc. Al ĝi apartenas preĝejo de S-taj Felikso kaj Adaŭto sur Wawel, konstruita el ŝtono. Kelkaj fragmentoj de la katedralo devenas el la XI. jc. kaj ilia origino koincidas kun la regado de la reĝo Boleslavo la Bra-

berto, S-ta Andreo, S-ta Nikolao. En la XIII. jc. la ordenoj de Franciskanoj kaj Dominikanoj komencis la konstruadon de siaj preĝejoj kaj monaĥejo, kaj samtempe estis konstruita sur la ĉefplaco la belega paroĥa preĝejo de S-ta Mario. En la XIV. jc. la reĝo Łokietek igis konstrui



Wawel. Enirejo kaj monumento de Kościuszko.


va. El la dua katedralo, fondita fine de la XI. jc. de Vladislavo Hermano postrestis la kriptoj de S-ta Leonardo, en kiu krom la reĝoj ripozas du gvidantoj de la nacio: Kościuszko kaj princo Jozefo Poniaowski. En tiu tempo oni konstruis en la urbo la preĝejojn de S-ta Adal-

novan, trian laŭvice katedralon sur Wawel, kaj en la sama epoko oni fondis en la urbo la preĝejojn de Dominikanoj, de S-ta Katarino, de Kristkorpo. El la profanaj konstruaĵoj apartenas al tiu epoko la gotikaj partoj de la reĝa kastelo, la Draphalo kaj la Urbodoma Turó sur la



ĉefplaco. En la sekvinta jarcento la pentrakaj skulptarto kaj la artindustrio atingis la supron de la disvolvo. En la aktoj kaj dokumentoj ni renkontas multajn fremdajn artistojn, kiuj havis siajn laborejojn en Kraków. Unu el la plej famaj estas la mondkonata Wit Stwosz, kies ĉefaltaro en la preĝejo de S-ta Mario apar-

Berecci kaj Johano Cini. Berecci estas aŭtoro de la Sigismunda kapelo en la katedralo, apartenanta al veraĵoj de renesanca arkitekturo en orienta Eŭropo. Ni citu plue la germanajn artistojn Hans von Kulmbach kaj Hans Dürer, kiuj postlasis en Kraków grandiozajn verkojn. En la fino de la XVII. jc. la Uni-



Altaro de St. Maria preĝejo skulptita en ligno. Verko de Wit Stwosz.

tenas al plej altrangaj artaĵoj de ĉiuj tempoj.

La disvolvono de la gotika arto en Kraków interrompis la renesanco. En la XVI. jc. laboras en la urbo toskanaj arkitek-  
turistoj, skulptistoj kaj pentristoj, inter-  
alie Francisko Firenzano, Bartolomeo

versitato fondis la barokan preĝejon de S-ta Anna. Ĝian internon ornamis per belegaj stiukoj la itala artisto Baltazaro Fontana.

Jam en la XVII. jc. komencas ludi gravan rolon hejmaj, polaj artistoj, al kiuj Kraków suldas ĉarmajn konstrua-

jo'n, altvalorajn pentraĵojn kaj skulptaĵojn, atestantajn pri alta nivelo de la pola arto. Ni citu nur tiajn nomojn kiel Stachowicz, Michałowski, Matejko, Kos-

sak, Siemiradzki, Pryliński, Szymanowski, Dunikowski kaj multaj, multaj aliaj, kiu atribuis al grandioza disvolvo de la pola arto en la XIX. jc.

## ELIZA ORZESZKOWA: SINJORINO UPUPO.

### Rememorajo.

Mi rakontos veran okazintaĵon. Nenion aldonante, nenion deprenante; mi rakontos, kiel efektive okazis. Negranda historio kaj — kiel preskaŭ ĉiuj historietoj tiuondaj — kun ĝaja komenco kaj malĝaja epilogo. Eĉ nun, kiam mi ĝin iatempe rememoras, eliĝas en mi malĝojo kaj iagrade honto. Ne pro mi. Pro kiu do? Eble pro la homa idaro. Antaŭ kiu? — Antaŭ birdo...

Iam... iam... antaŭ longa tempo — la suno de vivo staris ankoraŭ sur suda ĉielpunkto — ni venis el la urbo en vilaĝon por kelkmonata ripozo en bela, pentrinda vilaĝo.

La unuaj tagoj de envilaĝa restado — jen por la urbano post la vintra grizeco, malvasteco kaj laboro la festo de suno, de senlima bluo, de senĝeno. La maljunaj sentas sin junaj, la malĝojaj ĝojaj, la malfortaj viglaj kaj en la junajn ĉiu respiro ensorbigas ĝuon, ĉiu ĉirkaŭrigardo eliĝas varmegajn flamegojn. Ili ne paŝas, sed kuras, ne parolas, sed ridas kaj kantas. Ĉiuj reciprokaj malemoj kaj ofendoj foriĝas, la plendo ne nur sur la buŝoj, sed ankaŭ en la koroj silentiĝas, el la koroj malsarĝiĝas malhelaj vizioj, eĉ la korsange rugiĝintaj paliĝas kaj kaŝvolviĝas en la koranguloj — kurbiĝintaj, mallaŭtiĝintaj, venkitaj ĝis ĝusta tempo.

Pli poste, eble baldaŭ venos ankaŭ tien grizaj pluvveteroj, ekmuĝos malĝojigaj ventoj, en la animojn englitiĝos ree malbonaj fantomoj. Sed tiuj unuaj tagoj... nenio, ol ĝajeco, vigleco, forgeso, entuziasmo.

Estis sufiĉe multaj ni pli aĝaj kaj pli junaj, sed ĉiuj senescepte ni sentis nin ĝajaj, ĝojaj, feliĉaj, ravitaj.

Sub pura maro de ĉielbluo la ĝardeno disvastigis lagon de majverdaĵo, la blankaj akacioj floris. En la aero odoroj de rozoj, de kampherboj, de proksimarbaraj pinoj; en la arboj ĉirpado, kantoj, flirtado de etaj flugiloj. Ĉe la rando de alta

bordo — la zono de Niemem-rivero kun abunda, trankvila ondo.

Ni ne sufiĉis ankoraŭ esti ensorbintaj ĉiujn nin ĉirkaŭantajn miraklojn rigarde, aŭskulte, flare, ni ne estis ankoraŭ vizitintaj ĉiujn vojojn kaj silentejojn de vasta ĝardeno, kiam ni aŭdis interne en ĝi resonantan vokon de iu birdo. Ĝi kontrastis laŭte kaj klare de aliaj sonoj kaj zumoj de la ĝardeno kaj estis al ni nekonnata. Komence konstatis, iu: Kukolo! — Sed ne. Io tre simila al kukolo, sed ne ĝi. La elkrio sama, kiel de kukolo, konsistanta el du silaboj, sed oni povis elsentiri en ĝi pli ĝuste: hu — hu, ol: ku — ku, kaj aŭdigata same laŭtsone, sed per tono malpli klara, plaĉsona, pli ĝuste surda kaj raŭkema.

Pli atentinte ĉiris iu el la ĉeestantoj:

— Ĝi estas upupo!

Upupo! Kia ĝojo! Preskaŭ ridinde estas ekpensi, ke similaj bagatelajoj povas esti al kelkiu fonto de ĝojo! Multaj el ni neniam ankoraŭ estis vidintaj la birdon en tiuj regionoj maloftan... El kie ĝi eliĝis? Antaŭjare ĝi ĉi-tie ne estis! Kiel ĝi aspektas? La impresoj preskaŭ de fama artisto alvenanta en ĉefurbon dum vintra sezono, sed ankoraŭ nekonnata. Vidi, vidi ĝin tuj, tuj! Nur estis bezona tie nek bileto por teatra loĝio, nek tualeta, nek kaleŝo. Enmomente kelkaj fraŭlinoj trovis sin interne de la ĝardeno esperante en si, ke ili estos vidintaj — upupon. La fraŭloj ne akompanis nin. Nu, kiacele?... Estis ĉi tie ne tia birdo, kiun dum la ĉasado mortpafi kaj poste formanĝi estus virdece.

Ni iras do ŝtelmallaŭte sub la vico de vastemaj acernoj kaj fraksenoj, ni esplorrigardas, atentigas... Kaj jen proksimproksime, interne de la ĝardenkvartalo plantita per fruktarbo komencas aŭdiĝi kaj disaŭdiĝas plurfoje ĵom raŭka, sed laŭtsone, ĝaja: hu — hu! hu — hu! Ni kurretas tra ŝirantaj niajn vestojn ĝrosplantoj, sur herbeo sursuita de safiroku-

laj veronikoj, ni alkuras al maljuna, distendiĝema pirujo kaj haltas kiel alkroĉitaj, sufokante spiradon. Jen nealte en la kavaĵo de diktrunka pirujo — nesto... Sed antaŭ ol ni povis enrigardi en la truon, ekleviĝis el sur la branĉo kaj ekflirtis super niaj kapoj granda birdo kun bruna plumaro kaj atentinda plumtufo sur la kappinto. En tiu upupa tufo ekpetolis antaŭ niaj okuloj io fiero kaj provokema, kio ŝajnis diri: „Jen mi bravulo kaj suvereno! Jen mi sinjor', njoj'!"

Depost tuj ni komencis nomi ĝin: sinjor' upupo. Ektimigis nin tamen jen-ĉi bravulo kaj suvereno. Li forflugis kaj kune silentiĝis en la aero lia laŭta, gaja: hu — hu!

Sed el la kavaja rando eksvingis sin flugile nur iom kaj sidiĝis sur la pinto de plej malsupra branĉo dua birdo, tutsimila al tiu unua laŭ grandeco kaj plumaro, havanta nur malpli grandan plumfaskon sur la kapo. Ni ekdivenis, ke tio estis sinjorino upupo. Ŝi ne foriĝadis. Timis ŝi, ĉu ne timis — estis nur de ŝi sciate, sed ŝi ne forflugis, ne forkuradis... Ĉe la rando de fleksiĝema branĉo, balancanta sub ŝia pezo, ŝi restis gardanta la neston kvazaŭ kurbiĝinta, hintiĝinta, kun kolo al nia direkto etendita, rigardis nin per du malgrandaj, nigraj okuloj, en kiujn eniĝis nunmomente tuta ŝia birdanimo, animo maltrankviliĝinta, explorema demandanta, kvazaŭ petanta... En la kavaĵo de dika pirujtrunko troviĝis nesto kaj sur ĝia fundo kvaro da eta, apenaŭ plumkovritaj upupidoj. kiujn ni sukcesis trakalkuli, sed kiujn ni ne sufiĉis rigardi detale, ĉar ni bedaŭris la patrinon kaj ne volante ŝin pli timigi ni foriris simile, kiel ni estis alvenintaj — mallaŭte, sur piedfingroj.

Sed depost tiam la familio de Geupupoj loĝanta en malhela pirujkavaĵo iĝis objekto de nia delikata simpatio kaj zorgemo. En la homa vivo estas momentoj, kiam la homo amas herbon, florojn, birdojn, bonvenigas ilin ĉiutage kiel bonajn konatulojn ĉu amikojn, ĝojas pro ilia brilo, kompatas iliajn malbonfartojn kaj ili siaflanke disverŝas sur liajn tagojn kaj koron — ĝojon kaj kvietigon. Ĝi estas eble la momentoj, en kiuj la homa amo komencas surverŝi tra ili malĝojon kaj maltrankvilon.

Antaŭ ĉio la nove okazinta interkoniĝo provokis inter nia societo la problemon lingvistan. La patrinon de la upupa familio ni nomis tuj: Sinjoro Upupo, sed baldaŭ iu el la akompanantaro, lingva purpostulisto, komencis persvadi al ni, ke laŭ lingvaj principoj necesas paroli ne: Upupo, sed Upupino. Li estis prava, sed ĉar ni estis jam kelkfoje nian formon uzintaj kaj ĉar ĝi plaĉis al ni, ni krie silentigis la obstinulon kaj restis ĉe la vortaspekto: Sinjorino Upupo.

Ĉiutage kaj iatempe kelkfoje dum la tago unu, du el ni, aŭ ĉiuj kune iris dum hela, suna vetero internen en la ĝardenon kaj plej mallaŭte, plej trankvile laŭeble alproksimiĝinte al la maljuna pirujo ni rigardobservis la vivon kaj kreskon de upupa familio.

Kun Sinjor' Upupo ne estis farebla pli proksima konatiĝo, ĉar plej ofte li hejme forestis. Kelkiam tamen li sidis dum nia alveno sur la branĉo etendiĝanta super la nesto en streĉita pozo, fiero kaj gaje hu-ĉirpanta, sed post nia alproksimiĝo li foriĝis kaj aŭ tute el niaj okuloj malaperadis, aŭ sur apuda arbo sidiĝinte li kaŝis sin en ĝia foliaro tiel, ke nur la bruna pinto iagrade netoĉide kaj tute nefiere videbliĝis tra la foliaro.

Sed ŝi ĉiam restadis, ĉiam malpli maltrankvila, ĉiam pli konfide nin rigardanta el dika arbotubero aŭ najbara branĉo... Ni alportadis kaj diskutadis ĉe la arbradikoj la grenerojn kaj bulkerojn, kiujn ŝi post nia foriro kolektis kaj en la kavajon forprenis. Kelkpaŝe nur distance starante ni observis ŝin deflugantan surteren kaj enflugantan en la neston, nia najbara ĉeesto tamen neniel ŝin ĝenis. Ĝis fine rezultis, ke ŝi komencis nin alpepi. Kiam ni alproksimiĝadis, ŝi eligis el la gorĝeto sonojn abruptajn, kvazaŭ familiecajn: Bonan tagon! aŭ amikajn: Kion vi hodiaŭ alportas? Ŝi neniel pensis jam pri ia timo kaj trankvile restadis sur loko, kie ŝin nia vizito renkontis, plej ofte sur dika arbotubero elstaranta ĉe la nestotruo mem.

Vidante do, ke ni faras nenian ĉagrenon al la patrino, ni rigardis kuraĝe la idojn. Enrigardante en la kavajon ni rimarkis sur ĝia fundo kvar kapetojn, kvar



beketojn kaj nekklarformajn pro nesta duonlumo ĉiam pli grandajn korpetojn. Ili kreskis rapide kaj oni povis jam distingi la traĵojn de formiĝantaj super la kapoj kvar tufetoj. Tre ĉarmaj ŝajnis al ni tiuj ĉi etuloj kaj ni ŝparis al ili nek grajnon, nek panerojn, nek karesajn vortetojn, kiu certe estis al ili indiferentaj, sed ŝajnis plaĉi al la patrino, ili vekis almenaŭ nenian maltrakvilon aŭ nekontentiĝon en ŝi. Ŝi sidis tiam trankvile sur la branĉo aŭ sur la tubero turnante la tufekojn, jetante vivan, nigran okulrigardon tutĉirkaŭen kaj kelktempe afirmante per abrupta sed oftaj sonoj, kvazaŭ ŝi estus diranta: Jes! jes! belplaĉaj estas ĉi-miaj idoj!

Iafoje dumnokte subitiĝis fulmotondra kaj ventega tempesto. Ni aŭdis bruantan ekstere pluvegon, la arboj vipataj de la ventoj knaris, la fulmo krakfrapegis je interne en la ĝardeno. Neniu povis dormi kaj ĉiuj sentis, ke en tiel minaca nokto estos iel pli kuraĝige arope. Ni eliris do el niaj dormoĉambroj kun kandeloj en la manoj kaj apenaŭ ni renkontis nin en la salono, unu el ni aŭdigis:

— Kiel fartas nu niaj upupoj?

Kaj aliaj:

— Eble la fulmo trafis ĵus tiun pirujon?

— La ventego povas ĝin faligi!

— La pluvego dronigis ilian neston!

Tiuj niaj veoj pro supozata malfeliĉo de upupoj estis kaŝaŭskultataj de la fraŭloj kaj sekvintan tagon estis multe da rido kaj ŝercado je la temo: Kia do estas la fraŭlinaj zorgoj!

Sed post la nokta tempesto ekbrilis belega tago. Ni kuris al la malŝuna pirujo. Ĝi staras brilanta pro brilantaj en la suno gutoj de nokta pluvego, en la kavajo estas kiel antaŭe kvar beketoj kaj kvar tufetoj sufiĉe kreskintaj kaj nia amikino, sinjorino Upupo sidas sur malseka tubero kaj turnante la kapon kontraŭ la flugiloj ŝi glatigas al si, aŭ eble sekigas la plumojn. Ŝi jetrigardis nin kaj revenis al la zorgoj ĉe sia tualetto pro la pluvego kaj nokta uragano difektita; ĉe tio ŝi aŭdigis kelkfoje, kvazaŭ ŝi estus diranta: Nu, nu! Ĉio feliĉe! Estis danĝero, sed pasis! La malgranduloj bonfartas!

Baldaŭ tamen estis venonta ilia malfeliĉo, multe pli kruela kaj neniam pasonta. Ĉiam simile okazas; la vivantajn

estajojn tuŝas diversaj malfeliĉoj, ili pasas kaj ĉio ree reboniĝas, venos fine neevitebla, post kiu la vivanta estaĵo neniam plu bonfartos.

Ni sidis ĉiu sur ampleksa balkono, el kiu estis videbla vasta parto de ĝardeno, vico da disetendiĝaj acernoj, blankaj benkoj sub la acerno, blua Niemen kaj naĝveturantaj sur ĝi flavaj flosoj. Ni estis eble deko, la konversacio fluis vigle kaj brueme, kiam subite sur la lignan balkonapogilon falis granda, bruna birdo kaj en nemoviĝema figuro kvazaŭ rigidiĝis. Tuj je la unua rigardo ni ekkonis en tiu birdo sinjorinon Upupon kaj nia unua sento estis ekmiro. Kial ŝi alflugis ĉi tien? Kaj kiel povas okazi, ke nehejmiĝinta birdo alflugu tien, kie troviĝas tiom da homoj kaj tia parolbruo de homaj voĉoj aŭdiĝas? Ĉu ni jam tiom estis ŝin al homa estaĵoj kaj voĉoj al kutimiĝintaj, ke ŝi tute ilin timi ĉesis? Kaj kio alkondukis ŝin ĉi-tien? Ĉu ŝi alflugis vizitonte? El kie ŝi scias, ke ni tie ĉi loĝas kaj kio povas esti motivo de de la vizito? En tio estas io kaŝita, ho kaŝita! Ŝi sidas sur la balkonbalustrado kvazaŭ rigidiĝinta aŭ inerta, nia viglemaj kaj eĉ incititaj voĉoj faris al ŝi nenian impreson kaj nur siajn okulojn ŝi transŝovas ĉiam de unu el ni al alia, okulojn etajn, nigrajn, en kiuj koncentriĝis ree tuta ŝia birdanimo, sed tiun fojon ektimiĝinta, plendanta, bedaŭrinda. Mi eĉ ne imagas al mi, ke la figuro kaj cirkuloj de la birdo povu esprimi tiel traigan, senliman doloron! Ni ĉiuj ĝin rimarkis kaj unu el la sinjoroj ĉesante ŝerci diris eĉ:

— Tiun-ĉi birdon trafis ia malfeliĉo... tute videble! Sed kial ĝi alflugis ĵus ĉi tien?

Ha, jen! Malfeliĉo! Sed kia? Kaj kial ĝi alflugis ĉi tien?

Malrapide, peze ŝi malsupreniĝis aŭ pli ĝuste defalis el la balustrado sur la plankon kaj preskaŭ ĉe niaj piedoj komencis promenadi. Miriga estis tiu promeno. Ŝi pasis tiel proksime de ni, ke per la plumoj ŝi preskaŭ tuŝis la vestorandojn kaj kun suprenstreĉita kapo ŝi rigardis niajn vizaĝojn per tiuj du nigraj, plendoplenaj kaj kune demandantaj, petegantaj okuletoj. En ŝi estis videbla eĉ ne ŝajno de timo pro tiel proksima ĉesto de homoj, eĉ ne plej eta timo, nur

tuta ekstero de ŝia estajo ka' de tiuj ĉiam kontraŭ ni leviĝantaj okuletoj komprenigis apud doloro kvazaŭ urĝan demandon, kvazaŭ senvortan, sed traigan peton. Povis ŝajni, ke ĉe niaj piedoj ŝi serĉas ion, ke ŝi nin ion demandas kaj ion petegas... Ni rigardis mirigitaj, malĝojiĝintaj, helpon nesciantaj, kiam iu rimarkis:

— Eble ŝi vundita? serĉas helpon?

Ho, jes! Eble vundita? Necesas esplorrigardi! Kaj blanka, junulina mano, preta por savi kaj karesi, etendis sin kontraŭ la birdo. Ho, ne! Tion ĝi ne permesis! Preni sin ĝi ne permesis. Ĝi ekflirtis flugile ka' forflugis, sed ne malproksimen, inter la akaciojn kreskantajn tuj apud la balkono, kie ĝi alkroĉiĝis, bekon kontraŭ la balkono direktinte kaj rigidiĝis nemoviĝe, okulojn de balkono ne deturnante. Videble ĝi estis ema reveni, sed ĝi timis. Nune ĝi jam certe timis kaj kiu scias, kia lukto, kiel peza lukto daŭris en ĝi momenton inter timo kaj nekomprenata de ni peto aŭ espero. Tiuj lasta' superis. Ŝi deflugis el sur la arbo, sidiĝis ree sur la balustrado kaj fiksinte okulojn en nin komencis eligi sonojn tute malsama'n, ol kiam ĝi tie super la nesto alparolis kutime siajn idojn kaj nin. Tiu' sonoj raŭkis, plendis, pri io malĝojega rakontis, ion petegis... Tio estis tiel videbla kaj traiga, ke unu sinjoro stariĝis ka' forirante diris:

— Faru kun tiu kompatinda birdo laŭvole, mi ne povas ĝin rigardi!

Subite eligis en nia penso: eble ĉi akcidento en la nesto!

Ni kuris for en la ĝardenon kaj ŝi flugas. Ni enrigardas la kavtruon: nek beketoj, nek tufetoj, nek kapetoj estas! La nesto orfigita! Idoj rabbitaj! Nune klariĝis al ni senlima doloro de sinjorino Upupo, sed ne klariĝis — kaj neniam estis kontentige klariĝonta — kial ŝi en la okazinta al ŝi malfeliĉo estis veninta al ni, kial ĉe niaj fus piedoj ŝi ŝajnis serĉi la foriĝintajn idojn ka' enrigardis niajn vizaĝojn kun tiel plendega demando kaj peto? Tiu' ĉi demandoj, restontaj kompreneble sen respondo, vekis en nia interno tre ĉagrenigan senton. Ĉu ŝi eble ne supozas, ke fus ni estas rabintaj ŝiajn idojn? Ĉu ne pro tio fus ŝi serĉas ilin inter ni kaj petegas redoni ilin? Ŝi tiel

ĉiun timon pro ni forjetis — ka' jen... Eble estas tio strangajo, eble kaj ridindaĵo, se la homo respektas la senton kaj opinion de birdo pri si, sed estas fakto, ke la supozata suspekto de sinjorino Upupo pri tiel malnobla perfido eligis en ni — hontiĝon kaj maldolĉecon.

Kapo'n malĝoje klininte ni iris hejmen, kiam sur la korto aŭdiĝis voĉoj de la servistinoj vokantaj:

— Jus Tadeĉjo! jus Tadeĉo forprenis junajn upupojn el la nesto! Kiu vidis? Mi estis vidinta, kiam li portis ilin tien...

Ka' tuj sciis la servistaro pri nia ĉagreno, komencis tuj la esploron kaj estis tuj elserĉinta la kulpulon.

Li estis 9-jara filo de unu bienservisto, forta ka' bela knabo kun riĉa ora hararo, kun bluaj turkisokuloj. Li montris specialan inklinton por muziko kaj ludetis ian primitivan violonon kaj ludante samtempe dancis. La ludo estis fuŝado, la danco turniĝo sur unu loko kun iom sovaĝa subsaltado, sed kiam li eniĝis en la dancfervoron ka' akompanata de sia fuŝludado turnadis sin nudpieda en griza ĉemizaĉo ĉiam pli rapide kaj turbiĝe, tiam lia ora kaphararo larĝen balanciĝis ĉirkaŭ lia kapo, ekflamiĝadis kaj brilradiis liaj turkisokuloj, ruĝe ardis la laĉo liganta subkole la ĉemizon ka' li iĝis simila al malgranda, forta, plaĉa faŭnido.

Ni ŝatis Tadeĉjon, konis liajn gepatrojn, do tuj al ilia loĝdomo, al li... Sed ni rimarkis iam dumvoje lin iel sovaĝrigardan, ektimiĝintan. Li volis foriĝi, sed iu lin tenhaltigis. Li jam iel eksciis, ke ni scias pri la upupoj kaj koleras, do li ŝajnis iom ektimiĝinta, sed multe pli mirigita.

— Ĉu ci estis elpreninta upupidojn el la nesto?

Preskaŭ tuttrankvile li respondis:

— Mi elprenis.

— Kial ci faris tion?

Li ekskuis brake. — Ĉu mi scias?

— Kion ci volis fari kun tiuj birdoj?

— Ĉu mi scias?

— Ĉu ci ja ne aŭdis, ke vivestajojn turmenti kaj noci al ili ne licencas?

— Ĉu mi scias?

— Kion ci faris kun la upupidoj kaj kie ili estas?

Ekiĝis en ni espero, ke ni retrovos la birdetojn kaj se eĉ turmentitajn aŭ vunditajn reportos al la patrino.

Komplete trankvile ĉirkaŭiris la knabo ian budon kaj el iu angulaĉo kaŝita malantaŭ iu muro li alportis kvar birdajn kadavretojn. Ili pereis violencemorte kaj montris divensignojn de mortigo: du koletoj rompitaĵ, du kapetoj sangmakulitaĵ.

— Pro kio, nu, ci mortigis ilin? Por kio ili povis utili al ci?

Li staris antaŭ ni iom nur konfuzita, sed tute ne hontiĝinta aŭ pentanta, kontraŭe, per nia inkvizicio pli ĝuste iom ekkoleriĝinta. Komplete cetere li ne komprenis, kie estas la esenco. Tute simple li sciis nek kiacele li estis elprenanta la birdetojn el la nesto, nek pro kio ilin mortiganta, nek ke en tio povas enesti io ajn malnobla, nek entute, kial ni lin estis atakintaj, — li ne sciis.

Ka: kio estis farota? Ĉu la sangmakulitajn kadavretojn reporti al la patrino? Ke ŝi konfirmiĝu en la supozo, ke ĵus ni estas kulpaj pro la rabo kaj mortigo! Neniell! Ni iris al la piruĉo kun malple-

naj manoj kaj trovis ŝin turnflugantan ĉirkaŭ la arbo, ronden, ronden, jen pli malrapide, jen pli rapide, senĉese, senvoĉe... Apenaŭ je la sunsubiro ŝi falis peze inter la pintbranĉojn de piruĉo, kiun iom post iom mute komencis envolvi la krepusko de stelbrila vespero...

Postan tagon ni ne estis vidintaj, ne estis trovintaj jam ie ajn nian amikinson, Sinjorinon Upupon kaj neniam estis ŝin poste vidintaj plu.

La gaja „hu — hu“-ado de sinjoro Upupo en la ĝardeno — silentiĝis.

\* \* \*

Ankoraŭ nun, post jaroj, post multaj jaroj, kiam mi tiun incidenton rememoras, fariĝas al mi malgaje kaj iagrade... hontige. Hontige ne pro mi, ĉar mi tie nenion kulpis, sed antaŭ la patrino de gento birda pro la homa gento.

Kial do pro la homa gento, kiam nur Tadeĉjo...

Sed mi pri Tadeĉjo kaj pri lia: „Ĉu mi scias?“ rememorante hontas nun pro la homa gento.

Tradukis: Józef Orzech.

## GRAVA AVIZO.

**Garantia Kapitalo por la Jubilea Kongreso.**

Sub egido de P. E. D. estis kreita garantia kapitalo, kies celo estas certigi al L. K. K. en Varsovio necesajn monrimedojn por la preparaj Kongresaj laboroj.

Ĝis nun enpagis:

- 1) Prof. O. Bujwid, Kraków . zł 200.—
- 2) Józef Gładki, Kraków . . . „ 80.—
- 3) Kaz. Rouppertowa, Kraków „ 20.—
- 4) Dr. Leon Rosenstock, Kraków „ 30.—

Se la sukceso de nia Jubilea Kongreso ne estas al Vi indiferenta, tuj fariĝu garantianto!

### DANKESPRIMO.

Mi havas grandan plezuron danki tutkore pro specialaj servoj faritaj al mi kaj mia edzino dum mia vojaĝo tra Polujo, al gestajoroj: Sapiro en Białystok kaj al s-o Geršater en Vilno, same al M. Lewin, al fr. Pomeranc kaj gesinj. Osowicki en Białystok, fine al fr. Aro-nowicz, gesinj. adv. Litauer kaj fr. Halina Weinstein.

Adv. Dr. Leopold Dreher.

Abonu mem kaj varbu por „**Pola Esperantisto**“! Vi legos ĉiam interesajn novaĵojn pri la lando de Jubilea Kongreso!



## POLLANDA KRONIKO

**BIELSKO.** La 3-an de junio okazis ĝenerala kunveno de Esperanto-klubo, vizitata de 15 personoj. La malnova estraro estis reelektita. Nia movado mal multe kaj malrapide disvastiĝas, sed tamen oni povas konstati, ke de jaro al jaro kelkaj novaj samideanoj alvenas, kiuj restas fidelaj al la ideo. — La 8-an de junio mortis en Bielsko nia bona samideano, f-ino Jula Rauchmann. Ŝi ripoza en paco!

**KRAKÓW.** La Tutpola Kongreso en Kraków elektis novan Estraron de P.E.D., kiu konstituigis jene: prezidanto — Prof. Dr. Odo Bujwid, vicprezidantoj — Ing. Eugenjusz Tor kaj Dro Leon Rosenstock, ĝener. sekret. — Ludwik Kutscher, lia anstataŭanto — Rena Weinsberg, estrarano — Mgr. Tadeusz Hodakowski, kassisto — Józef Alfus.

Dro Leon Rosenstock akceptis la postenon de la Delegito de U.E.A. en Kraków.

**WARZAWA.** En Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo — „STEP” — deĵoroj okazas ĉiuŝaŭde h. 20—21.30 en la ejo de Kuracista Asocio ĉe str. Królewska 23. Adreso por korespondadoj: Warszawa, str. Leszno 99, m. 5. Tel. 59837. La 22-an de majo okazis en STEP dum kluba vespero prelego de s-ano adv. Litauer je temo: La granda norda vojo kaj la 28-an de majo prelegis s-ano Cense pri „Nova originala utiligo de la radio”.

Malgraŭ la tropikaj varmeĝoj ne ĉesiĝis la agado de Varsovia Esperantista Societo. La 18-an de julio komenciĝis nova kurso por komencantoj kun 42 partopr. La kurson gvidas s-ro I. Dratwer. Societo (sekretariejo, biblioteko, legejo) estas malfermata ĉiumarde de h. 20—22. Adreso de Varsovia Esperantista Societo estas: Zielna 29/10, tel. 271-43.

**WILNO.** Lastatempe Turista Esperanta Rondo ĉe Vilna Ŝ. T. K. aranĝis grandan kaj belan Esp. Akademion kon partopreno de eksterurbaj ĝesamideanoj. Akademion malfermis v-prezidanto s-ano S. Ŝik kiu parolis i. a. pri la tutpollanda Esp. Kongreso, pri U. K. en Vieno kaj jam propagadis la U. K. en Varsovio (50 jaroj de Esperanta movado). Salutparoladojn havis D-ro M. Perlman (Łomża), Mgr. M. Blecher (Kraków), Dro A. Gurviĉ (alportis ĝoigan salutan de la Zamenhofoj el Varsovio), S-ano Łapido (Suwałki), H. Lenczut (Łódź), Kamieniecki (Białystok), Subornik (Wilno) kaj artpentristo Santler (Germanujo) ktp.

En la dua parto de Akademio partoprenis i. a. s-anoj Blecher, A. Brudno kaj Minkow.

Oni ludis kaj kontis esp. himnon „Espero”, deklamis esp. verkojn, kaj fine dancis. La salono, kie okazis esp. akademio estis bone kaj bele ornamita per diversaj interesaj esperantaĵoj. TERO nun gvidas superan esp. kurson sub la gvidado de Dro A. Gurviĉ.

## NOVAĴOJ EL ESPRANTUJO

**ANGLUJO.** La XIV-a Internacia Tendaro de Skolta Esp. Ligo okazis nunjare apud Ipswich, ĉefurbo de graflando Suffolk de la 18-a ĝis la 29-a de julio.

**AŬSTRIO.** La aŭstria Esp.-movado estas feliĉa noti nun gravegan sukceson de sia batalo por enkonduko de Esperanto kiel urĝe necesa helprimedo de l' internacia trafiko: la Aŭstria Ĝenerala Direkcio de Poŝtoj kaj Telegrafoj en Vien ĵus eldonis novam serion de oficialaj poŝt-

kartoj por korespondo kun la eksterlando (kun enpresita poŝtmarko de 35 groŝoj), surhavantaj maldekstre sur la adresflanko 50 diversajn bildojn de tipaj aŭstriaaj pejzaĝoj kaj vidindaĵoj kun klariga teksto en la lingvoj germana, franca, angla kaj en Esperanto.

**BELGUJO.** En la monato junio k. j. okaze de la remalfermo de la belgaj leĝdonaj Ĉambroj estis prezentita leĝopropo, laŭ kiu la enkonduko de Esperan-

to estu enskribita en la programon de publika instruado. Tiun ĉi leĝoproponon subskribis 10 deputatoj kaj 6 senatanoj. (El „Heroldo de Esperanto“).

**ĈEĤOSLOVAKUJO.** Ĝis nun en 63 fervojaj stacidomoj estas fiksitaj sur la murojn tabuloj kun teksto en Esperanto.

**FRANCUJO.** Dum la monato majo k. j. oni donis la nomon „Zamenhof-strato“ al unu el la stratoj de la urbo Houeillès (depart. Lot-et-Garonne), Perpignan (depart. Pyrénées-Orientales, 40.000 loĝantoj), Thiers (depart. Puy-de-Dôme, 75.000 loĝantoj) kaj Liévin (depart. Pas-de-Calais, 28.000 loĝantoj). La solenan inaŭguron de la nova Zamenhof-strato en la urbo Thiers ĉeestis f-ino Lidja Zamenhof, filino de la Majstro.

**GERMANUJO.** La 25-a jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio okazis je Pentekosto en Weimar. Malgraŭ la ordono de la germana Vicĝvidanto, kiu malpermesis al la anoj de la nacia-socialista partio esti membroj de GEA, la kongreso brile sukcesis. La venontjara kunveno okazos en Berlin. Jam 26 samideanoj aliĝis al la kongreso okazonta je Pentekosto 1937.

**NEDERLANDO.** La eksterordinara ĝenerala kunveno de la akciuloj de la Akcia Societo „Centra Esperanto Librejo en Hago“ decidis en junio 1935. likvidi la societeton. La estraro nun sciigas al siaj esperantistaj akciuloj, ke la monrimedoj jam nun permesas repagi al ili 100% de la kapitalo. La profita saldo estos dividita inter la partoprenintoj kiam ĉiuj restanta libroj estos disvenditaj.

**SVISUJO.** En Genevo, je la 4-a de julio k. j. tri-persona komisiono kontrolis la ensenditajn voĉdonilojn kaj konstatis, ke la rezulto de la voĉdonado estas jena:

Dissenditaj voĉdoniloj — 1400. Resenditaj valida voĉdoniloj 901, el kiuj 710 aprobis la translokiĝon de la Centra Oficejo de UEA al Londono, kaj 191 voĉdonis kontraŭ ĝi.

La translokiĝo okazis kelkajn tagojn post la kunsido de la kontrol-komisiono. De nun oni sendu ĉiujn leterojn, gazetojn k.t.p. por UEA al: 142 High Holborn, London W. C. 1., Anglujo.

La Centra Oficejo firme esperas, ke ĉiu Esperantisto, kiu povas, aliĝos aŭ realiĝos al UEA por helpi ĝin en la plej danĝera momento de ĝia vivo.

#### A L V O K O.

Venu al la Popolfesto de Wels, al plej grandstila agrikultura Ekspozicio de tuta Aŭstrio, okazonta de la 30-a aŭgusto ĝis la 6-a sept. 1936. En la kadroj de la ekspozicio okazos interesaj sportaj vetludoj kaj diversaj distraĵoj.

La Internacia Bahaa Esperanto Rondó tre kore invitas al sia FAKKUNVENO, okazonta en la kadro de la Universala Esperanto Kongreso en Vieno, merkred-

de, la 12-an de aŭgusto 1936, je la 10-a horo. I. a. estos prelegita letero de Abd'ul-Baha, pri Universala Paco, sendita al la Centra Organizaĵo por Konstanta Paco en la jaro 1919. Tiu ĉi komuniko ankoraŭ hodiaŭ posedas sian tutan sigsifon.

S-ano Wacław Zalecki, iam loĝinta en Litovio, serĉata. Lin aŭ liajn konatojn mi petas skribi al Jozefo Petrulis, **Wer Resister International, II, Abbey Road, Middlesex, ENFIELD.** Anglujo.

**PRENUMERATA:** rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. sw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

**OGŁOSZENIA:** 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

**PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR. 29.**

**ABONO:** jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

**ANONCOJ:** 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

**KONTO P. K. O. NR. 408.000.**

**REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.**

Drukarnia L. Gronusis, d-iertawca J. Kowalski.

Redaktor odpowiedzialny: Dr. Leon Rosenstock.

